


LA VERDA SAGO

PORTAS LA VERDAN STELON
EL LA LANDO DE LA SOLECA STELO



9

MAJO
'79

HECTOR CAMPOS-GREZ
CASILLA 231 RCH7-CURILLO
CHILE

ĈILIA
ESPERANTO-
ASOCIO



Karaj ĉiliaj amikoj:

Post la partopreno en la sciencna simpozio en Marília, kaj vizito al Argentino kaj Urugvajo, kun granda ĝojo mi alvenis al Santiago, kie min kore akceptis amikoj Ivano, Danielo kaj Davido, malfrue en la nokto. Pro grava malfruigo de la flugo bedaŭrinde ne povis okazi la planita prelego en la universitato, sed des pli ĝojiga estis la renkontigo kun la gvidantaj personoj de la ĉilia Esperanto movado en la hejmo de la ĝenerala sekretario George Tachauer.

Mi estas profunde impresita de

la kuraĝo kaj la entuziasmo de la ĉiliaj esperantistoj, pri via celkonscia laboro por antaŭenigi Esperanton ankaŭ en Ĉilio. La ĉefa celo de mia vojaĝo estas proksimigi U.E.A. al la latinamerikaj esperantistoj kaj vin al U.E.A., plifortigi la amikajn rilatojn, studi viajn problemojn kaj laŭeble subteni kaj helpi vin en viaj klopodoj por disvastigo de Esperanto. Se mi povis iom stimuli vin, mi estas tre feliĉa.

Per nebulo en la flughaveno Ĉilio ŝajnis montri ke ĝi ne volas lasi min foriri. Mi restadis ĉi tie dum ekstraj tagoj kiel Robinson Crusoe sur sia insulo, sen ebleco daŭrigi mian vojaĝon. Aparte mi korege dankas al Daniele Zanelli kaj lia edzino pro la bonkoreco, per kiu ili gastigis min ĝis fine mi trovis eblecon pluiri.

Karaj amikoj, koran, koregan dankon! Dezirante al vi ĉiuj multe da prospero en viaj daŭraj klopodoj por Esperanto, mi promesas al vi ĉian eblan subtenon flanke de U.E.A.- Kune ni formas "unu grandan rondon familian". Ĝis revido, kie ajn en la mondo ni denove renkontigos.

Via amiko

C. Stöp-Bowitz.

UEA Y OEA

Con profunda satisfacción y natural alegría hemos recibido del Dr. Humphrey Tonkin, la noticia por la cual la Organización de Estados Americanos (OEA) ha resuelto establecer una formal colaboración con la Asociación Universal de Esperanto (UEA).

Es un gran paso que la más grande Organización Esperantista Mundial ha dado en este lado del mundo, América.

Hasta hace poco el Movimiento Esperantista centraba sus actividades prácticamente sólo en Europa. Su sede, Organismos e Instituciones en países en el viejo mundo. De los 63 Congresos Universales sólo 4 se han efectuado en América y Asia.

Tal vez eran otros tiempos y las circunstancias así lo exigían. Tal vez quienes guiaban los destinos de UEA miraban hacia los países americanos con cierta indiferencia o escepticismo debido al poco desarrollo del Movimiento Esperantista.

Pero ahora tenemos ante nuestros ojos, nuevos horizontes en la conquista de los grandes ideales de Zamenhof.

Ultimamente en varios países americanos está creciendo el interés por el Idioma Internacional.

El Primer Congreso Latino-Americano realizado en Marilia (Brasil) en 1978, nos parece fué la partida en esta gran "maratón" en que el afán de los participantes no consiste en aventajar a los demás, sino en buscar el medio adecuado para un trabajo continuo y unido. Hace algunas semanas, científicos esperantistas han escogido suelo americano para tratar sus temas en un Simposium.

Tenemos ya la información que en Julio de 1980 se realizará en la ciudad de San Luis (Argentina) el Segundo Congreso Latino-Americano de Esperanto el que a su vez será el Primero de toda América.

Chile no está quedando atrás en esta maratón, ya que poco a poco y con una gran cuota de sacrificio, aunque a veces no compartido, estamos saliendo del letargo.

UEA se acerca a nosotros y nosotros a UEA. Ello en parte ha quedado demostrado por dos ilustres miembros de su Directorio que nos han visitado. Hace una semana pudimos conocer al Dr. Carl Stöp-Bowitz, Vice Presidente, y a fines de 1977 a la Sra. Ursula Grattapaglia, Directora de Actividades Regionales y Nacionales. Esto y otros acontecimientos han contribuido en crear una buena imagen del esperantismo americano ante la opinión pública y ante organismos tan importantes como lo es OEA.

¿De qué manera UEA y OEA trabajarán en conjunto?

A saber, existen dos categorías de colaboración entre OEA y otros

Organismos. "Relaciones especiales de colaboración" basadas en comunes proyectos y "Relaciones de colaboración general" consistente en un mutuo apoyo, intercambio de informes en asuntos de interés común.

Sin duda alguna que a UEA le interesa una colaboración en el campo cultural, educacional, específicamente de aspectos lingüísticos.

La Organización Esperantista está dispuesta a dar a conocer entre sus miembros el trabajo y programas de OEA, principalmente en lo que a cultura se refiere, de acuerdo a los estatutos de una Organización Internacional "Neutral" como lo es UEA.

El Dr. Tonkin aclara que la finalidad de nuestra futura labor no estará encaminada a convencer a OEA que solucione sus problemas mediante el Esperanto, sino que debemos ante todo demostrar que el Esperanto es en sí culturalmente útil y que posibilita el acercamiento de los pueblos.

El documento por el cual la Organización de Estados Americanos establece relaciones de colaboración con la Asociación Universal de Esperanto está firmado por su Secretario General Sr. Alejandro Orfila, quien concluye textualmente:

"Tengo fe que las relaciones, ahora establecidas serán de ventaja, no solamente para nuestras Organizaciones, sino también para los pueblos a los que tenemos por finalidad servir"

ĈESPA desde ya da al más amplio apoyo a todas las gestiones del Presidente Tonkin estime conveniente realizar con OEA. Y este apoyo no sólo ha de ser moral, sino ante todo, con nuestro trabajo en este rincón de América llamado: **C h i l e**.

Iván Mättig C.

ESPERANTO-NOVAĴOJ

Laŭ letero ricevita de S-ano Enrique Kohel el Rosario, Argentino, ni povas informi, ke en 1980 okazos en la argentina urbo SAN LUIS la Unua Tutamerika Kongreso de Esperanto kaj Dua Latin-

amerika

Ĝi certe estos en la monato julio, kaj preskaŭ certe de la sabato 12-a. Oni deĉidis ke ĝi estu Tutamerika, por havi reprezentantojn de la tuta kontinento.

Por pliaj informoj, skribu al S-ro ENRIQUE KOHEI,
JUNÍN 1599 - 2000 ROSARIO
ARGENTINO.

Flanke oni reproduktas la kompletan tekston de la Deklaro de Unuiĝintaj Nacioj je la 20^a de novembro 1959 . En dek zorge redaktitaj Principoj , la Deklaro asertas la rajton de la infano por ĝui specialan protekton k disponi oportunojn k servojn , kiuj lin permesu sin disvolvi sane k normale , k en marespekto k libereco; por havi nomon k naciecon ekde sia naskiĝo ; por ĝui la bonon de socia sekureco , inkludatajn taŭgan nutradon, loĝejon , amuzon k kuracan servadon ; por ricevi traktadon , edukon k zorgon specialajn se li suferas iun maleblecon ; por kreski en etoso kora k sekura k , se eble , sub la protekto de siaj gepatroj ; por esti edukata ; por esti inter la unuaj protektataj k helpataj okaze de katastrofoj ; por esti protektata kontraŭ ĉiu speco de forlaso , krueleco k ekspluatado ; k por esti protektata kontraŭ praktikoj kiuj povu inciti iun ajn formon de ekskludo .

Fine , la Deklaro enfazas, ke la infano "devas esti edukata en spirito de komprenemo , toleremo , amikeco inter la gentoj , paco k monda frateco ".

A N T A Ŭ P A R O L O

KONSIDERANTE , ke la popoloj de la Unuiĝintaj Nacioj reasertis en la Ĉarto sian fidon pri la fundamentaj rajtoj de homaro kaj pri la digno k valoro de la persone , kaj sian decidecon antaŭenigi la socian progreson kaj altigi la vivnivelon ene de pli ampleksa koncepto de libereco ,



KONSIDERANTE , ke Unuiĝintaj Nacioj proklamis je la Universala Deklaro de Homaj Rajtoj , ke ĉiu persono havas ĉiujn rajtojn kaj liberecojn en ĝi esprimatajn , sen iu ajn distingo pro raso , koloro , sekso , lingvo , religio , politika aŭ alispeca opinio , nacia aŭ socia deveno , mona pozicio , naskiĝo aŭ iu alia kondiĉo ,

(Daŭrigo)



Esperanta Literaturo havas multajn tradukitajn verkojn kaj, kontraŭe al kio multaj homoj pensas, tre grandan nombron da originalaj verkoj.

El la plej elstaraj esperantlingvaj verkistoj estas virino, kiu, ni povas diri, estas la plej grava esperantlingva verkistino.

"La Verda Sago" havas la plezuren kaj honoron oferi al la legantaro la aŭtobiografionde

D-ino. Marjorie BOULTON

kion, laŭ ŝiajn propraj vortoj, ŝi skribis speciale por ni.

-0-

A U T O B I O G R A F I O. (D-ino.M.Boulton).

Mi naskiĝis la 7an de majo, 1924, proksime al Londono, el gepatroj jam ne junaj, kaj restis la sola infano.. Mi ŝerce diras, ke estis eble aŭgure, ke mi pasigis miajn plej fruajn jarojn en domo, kies adreso rilatis al la angla poeto Alexander Pope! Sed, kiam mi estis okjara, mia patro, instruisto, iĝis lernejestro en kampara gimnazio, kaj ni translokiĝis al norda kamparo, ion filiistra medio.

Mian infanecon mi ĝenerale memoras kiel tempon malfeliĉan, la lernejon ĝenerale kiel misedukejon kaj malstimulejon mensan; sed kiam mi estis eble 15-jara, la angla verkisto, Henry Treece, iĝis instruisto en la gimnazio, kaj ege helpis mian intelektan evoluon. Mi per multaj ekzamenoj gajnis la necesan stipendion, por iĝi studentino en la universitato de Oxford, kie mi studadis por unua diplomo en 1941-44, por dua diplomo en 1946-48. Mian universitaton mi ankoraŭ profunde amas.

Ekde eble mia 14-a vivojaro, mi komprenis, ke mi deziras esti serioza verkistino; mi vere sentis min vokita al tiu profesio. Mi daŭre penadis verki, sed la vivo de verkisto estas finance malfacila; mi ne bone komprenis, kiel agi; kaj mi devis tuj subteni min mem.

(Mia patro mortis kiam mi estis ankoraŭ studentino; tamen, li ne kuraĝigis min verki, kaj ne estus povinta helpi min). Kontraŭvole, ŝiam sentante, ke mi perfidas tion, kio plej gravas

al mi, sed konscience, ĉar mi ne volis ricevi salajron kontraŭ laboro ne dece farita, mi dum 24 jaroj laboradis kiel instruistino en lernejo aŭ en seminario por instruistoj. Ironie, sentante ĉiam, ke insence mi nur min prostituas, mi laboris tiel diligente, ke oni min promociis, kaj eĉ dum ok jaroj mi estis direktorino de seminario. Sed mi konsideras tiujn 24 jarojn kiel plejparte malŝparitajn; kaj kredeble la plej tragika eraro de mia eraroplena vivo estis, ke mi ne pli forte kaj memfide strebis sekvi plene mian veran profesion.

Tamen mi almenaŭ verkis dum postprofesiaj horoj; mia unua angla verko, poemaro, aperis en 1949; ĝis nun aperis 14 anglaj libroj miaj, inter ili biografio de Zamenhof, kaj traduko de verko de Tibor Sekelj; nova libro mia, pri studado de literaturo, estas nun ĉe mia angla eldonisto.

Mi esperantiĝis en 1949, kaj iĝis serioza esperantisto plejparte ĉar la verkoj de Kalocsay montris al mi, ke Esperanto plene taŭgas por kompleksaj kaj altnivelaj literaturaĵoj. Tamen la noblaj, universalaj, humanismaj celoj de Esperanto ĉiam tre gravis al mi; mi ankoraŭ sentas, ke laboro por Esperanto estas malgrandskala sed utila persona laboro por paco, toleremo, kulturo kaj libero, por vera internacia amikeco kaj reciproka respekto.

Mi komencis verki iom en Esperanto en 1952. Miaj plej valoraj esperantaj verkoj estas kredeble la poemaroj Kontralte, Eroj kaj Cent Ĝojkantoj; mia esperanta biografio de Zamenhof, kvankam ĝi jam estas iom eksdata; eble la novelaro Okuloj; aperis ĝis nun entute 10 esperantaj libroj miaj, ankaŭ multaj artikoloj kaj recenzoj.

Kiam en 1970 kelkaj malamikoj, plus propraj malsano kaj malfortoj, perdigis al mi mian postenon de direktorino, mi unue sentis min en katastrofa situacio; sed estis eble la plej granda beno de mia vivo; ĉar, perdinte karieron, mi retrovis vivsignifon kaj esperon. Mi iel sukcesis subteni min, doktoriĝis en Oxford pri literaturo, kaj decidis, ke mi pensu ne malŝpari la restantajn jarojn. Mi nun loĝas en domo modesta, malŝika, pro mia okupiteco ne ĉiam tro pura, sed propra kaj indi-

vidueca, libroplena kaj visitata; mi loĝas en mia amata Oxford, kie mi rajtas daŭre uzi la mondfaman Bodlejan Bibliotekon; kaj mi gajnas mian panon, sufiĉe kvankam ja ne riĉe, kiel verkistino. Eĉ mi foje iom gajnas por esperanta verkado, kvankam ĝis 1976 mia esperanta verkado estis tute senpaga. Nuntempe mi preparas esperantan legolibron, kaj esperas ke ĝi estos iom originala. Sed mi esperas, ke mi vivos sufiĉe longe, por verki multajn aliajn volumojn en la angla kaj en Esperanto; mi tre sentas, ke mian plej bonan laboron mi ankoraŭ ne faris. Mi nun estas multe pli feliĉa, ol iam ajn antaŭe en mia vivo.

Kio alia pri mi? Se mia vivo entute iom valoras estas per miaj verkoj. Nu, inter miaj plezuroj estas kuirado, kaj, bedaŭrinde, manĝado - mi estas tro grasa; katoj; la natura mondo; juveloj; lingvoj; bildkartoj; sed plej gravas al mi literaturo kaj amikeco. Mi havas tre multajn geamikojn en diversaj landoj. Mi restis fraŭlino kaj vivas sola. Iam, fervoraj bigotoj sukcesis puŝi min en ateismon, sed mi nun estas di-kredanto, kvankam ne ekleziano. Eble ĉar la vivo estas tiel plena de enigmoj, kiujn oni ne povas solvi, la homoj ŝatas solveblajn enigmojn, kaj mi suplementas mian enspezon per preparado de enigmoj per gazeto!

Ĝis nun mi vizitis 17 landojn en tri kontinentoj; kaj mi povas sincere diri, ke en ĉiuj el ili mi renkontis simpatiajn homojn kaj vidis belaĵojn. Mi esperas, ke Esperanto helpos nin plifortigi niajn sentojn pri la esenca frateco de ĉiuj homoj, kaj venki antaŭjuĝojn kaj malamojn.

Por mi persone, mi ne povas dubi, pri la du faktoroj, kiuj plej larĝigis vivon, kiu alie estus sufoke mallarĝa kaj senkolora; kiuj donis iom da digno al vivo grandparte fuŝita: unue, nepre Esperanto, kiu malfermis al mi la mondon varian, tragikan, kaj interesan; kaj due, mia amata universitato, modelo malgrandskala de mondo vere civilizita.

D-ino. M. Boulton.

En la venonta numero de "LA VERDA SAGO" aperos kelkaj verkoj de D-ino Boulton.

NI KANTU EN ESPERANTO

"HIMNO DE JOHN BROWN"

(Gloria Aleluya)

Korpo de John Brown nun kuŝas
en la tomb' (3)

sed plu marŝas lia spirit'.

Gloro, gloro, haleluja (3)

sed plu marŝas lia spirit'!

Steloj de Ĉiel' rigardas kun
estim' (3)

al la tombo de John Brown.

Gloro,.....

Li fariĝis la soldat' de Di'
Sinjor' (3)

marŝas plu spirit de li!

Gloro,.....

Negrojn suferegis vipo de
slavist' (3)

vidis ĝin John Brown kun trist'!

Gloro,.....

Trup' el Virgini' leviĝis
al milit' (3)

por liber' sub lia gvid'!

Gloro,.....

Aron kuraĝulan venkis la
perfort' (3)

al John Brown juĝita mort'.

Gloro,.....

De urbo Charleston aŭdiĝas
trist-sonor' (3)

de John Brown jen lasta hor'.

Gloro,.....

Korpo de John Brown ne estas
plu ĝe ni (3)

vivas lia bongeni'.

Gloro,.....

¿QUE SERA, SERA?

Demandis mi en infanaĝ'
pri de l' estonto mistera pag',
Ĉu feliĉigos la vivo min,
respondis la patrin':

"Qué será, será",
per nekomprenebla vort'
parolas venonta sort':
"Qué será, será"
tiel ĝis la mort'!

Kaj same mia amatin'
respondis pere de tiu kant'
dum mi varnege certigi ĝin
esti fidelamant'.

"Qué será,.....

Nuntempe kun grandega pet'
demandas same mia filel'
kaj mi respondas simple al li
per tiu melodi':

"Qué será,.....

(el la "Junular' kantanta")

LA INFANOJ NE KONAS LANDLIMOJN

Nigra, blanka aŭ flava,
tio estas tute egala.
Ni estas gefrata rondo
ĝirkaŭ la tuta mondo.

Negro, blanco o amarillo
tanto da, ello es igual,
si formamos en el mundo
una ronda fraternal.

(Internacia Jaro de la Infano)

KIEL DISVOLVIĜAS LA E-O MOVADO , NOMBRE ?

Laŭ proksimume komuna sperto ni supozu ,

Hipotezo I : Je iu loko-tago , la personoj konantaj aŭ sciantaj E-on distribuiĝas proporcie jene:

kvalito	nombro	ekzempla konjekto
spitaj	s	2
neŭtralaj	n	6
aprobantaj	a	11
lernantoj	l	13
uzadantoj	u	4
disvastigistoj	d	1
	$s+n+a+l+u+d$	37 ,

kaj

Hipotezo II : Dum iu intertempo at, ĉiu el ili - intence aŭ ne - igas la lingvon konata de aliaj personoj laŭ sia sinteno pri ĝi , tiel efikante iajn nombrojn da novaj konantoj , ekzemple :

I.	s	n	a	l	u	d	
II.							
s	2	1	1	1	-	2	36
n	2	2	3	4	5	6	127
a	1	3	5	7	9	11	213
l	1	2	4	8	16	32	258
u	-	-	2	3	4	5	82
d	-	-	-	1	2	3	24
	12	48	165	312	144	59	740

La sumoj je linioj k kolumnoj rezultas laŭ la ekzemplaj nombroj je Hipotezo I , k ilia tutaj e-galas 20 ($s+n+a+l+u+d$) .

Jen demandoj pri la dialektika afero de la disvolvo :

1. Ĉu la ĉi proponitaj hipotezoj taŭgas ?
2. En Hipotezo I , kiuj povas esti la plej faktaj nombroj s , n , a , l , u , d ?
3. Je Hipotezo II , simila demando pri ekzemplaj nombroj .
4. Kiel estas at influita de lokaj k tempaj kondiĉoj ?

Mi opinias la problemon ne nur spekulative interesa , sed probable niaj IAdEM-anoj aŭ statistikistoj iam studis tiajn empiriajn funkciojn .

Certe la sistema esplorado trovos novajn helpilojn por kreskigi u kaj malkreskigi s .

Ankaŭ ni , serĉu ilin ĉia , ĉiam , ĉie kaj ĉiel .



Ĉ U V I S C I A S , . . .

ke infano konceptis la mondan lingvon ?

ke li mem , jam viriĝantulo ellaboris ĝin ?

ke kiam junulo li daŭre provis kaj eksperimentis sian verkon kiel esprimilon , riĉigadis kaj ĉiam perfektigis ĝin ?

ENHAYO DE LA VERDA SAGO, 1ª Duonjaro

AUGUSTO '78, # 1	
Esperanto, el idioma internacional (1ª parto)	Daniel Zanelli
Nia agado - Deziras korespondi - Pruntedonado Servo - Novajoj	Jorge Tachauer
La Unua Latinamerika Kongreso de Esperanto	Iván Máttig
Esperantaj Fakoj pri ĉio - Geonkloj Esperantistaj - Serĉas korespondantojn - Humuro	J. T.
Nik Nek kaj Kat Jen	Julio Baghy
SEPTEMBRO, # 2	
Esperanto, el idioma internacional (Fino)	D. Z.
Algunos libros conocidos, traducidos al Esperanto	D. Z.
Esperantaj Fakoj pri ĉio: Koresponda Servo Mondskala (KSM) - Muzika E-o. Ligo (MEL) - Serĉas korespondantojn! - Humuro - Ĉu vi scias...?	J. T.
Io pri la paco	J. T.
Vortareto: A, B	(Adapto) D. Z.
Nik Nek kaj Kat Jen	(Daŭrigo) J. B.
OKTOBRO, # 3	
Ekkonu la esperantan prononcadon, Conozca la pronunciación del Esperanto	D. Z.
Scienco por ĉiuj	(Resumo) D. Z.
Nik Nek kaj Kat Jen	(Daŭrigo) J. B.
Nuestra invitación	D. Z.
Vortareto: C, Ĉ, D, E	D. Z.
Carta de afiliación, Aligilo	
NOVEMBRO, # 4	
Cómo se aprovecha el Esperanto, Kiel oni profitas Esperanton	D. Z.
Nik Nek kaj Kat Jen	(Daŭrigo) J. B.
Los sufijos, La sufiksoj	D. Z.
Hieroglifo - Semajno - Serĉas geamikojn	J. T.
Vortareto: F, G, Ĝ	D. Z.
DECEMBRO, # 5	
Zamenhof-tago	I. M.
Cómo se aprovecha el Esperanto, Kiel oni profitas E-on. (Daŭr.)	D. Z.
Nik Nek kaj Kat Jen	(Daŭrigo) J. B.
30ª Datreveno de la Deklaracio de Homaj Rajtoj - Int. Gazetara Servo UEA	
Los sufijos, La sufiksoj	(Daŭrigo) D. Z.
La Parolo	Ángel Ganivet, tradukis D. Z.
Balkana Milito	Bertolt Brecht, tradukis J. T.
Serĉas korespondantojn! - Papo Johano Paŭlo la Dua - Ni perdis amikojn	J. T.
Vortareto: H, Ĥ, I, J, Ĵ, K	D. Z.
JANUARO-FEBRUARO, # 6	
Leteroj al ni	Marjorie Boulton, William Auld.
La sufiksoj	(Daŭrigo) D. Z.
Iom pri scienco	(Resumo) D. Z.
Poemoj de Kalocsay, Ragnarsson, Heine, Maura	Kompilis J. T.
Nik Nek kaj Kat Jen	(Daŭrigo) J. B.
Popoledukado	Giuseppe Mazzini, tradukis J. T.
Serĉas korespondantojn! - Kontentiga evento	J. T.
Hieroglifo - Humuro 1, 2	J. T.
Vortareto: K	D. Z.

LA ADVERBOJ KAJ ADVERBAJ ESPRIMOJ

Ili kvalitigas verbojn, aliajn adverbojn, adjektivojn k eĉ frazojn .
La adverboj estas : I) Primitivaj , kiel

1. Tempaj

<u>Antaŭ ĉio</u>	ante todo	<u>Antaŭ ĉio</u> , ni klarigu la aferon .
<u>antaŭhierau</u>	anteayer	Mia nevo alvenis <u>antaŭhierau</u> .
<u>hierau</u>	ayer	Oni vokis lin <u>hierau</u> , ĉu ne ?
<u>hodiaŭ</u>	hoy	<u>Hodiaŭ</u> mi finos ĉi tiun taskon .
<u>morgaŭ</u>	mañana	Ŝi komencos studi <u>morgaŭ</u> , eble .
<u>postmorgaŭ</u>	pasado mañana	La faruno daŭros ĝis <u>postmorgaŭ</u> .
<u>baldaŭ</u>	pronto	Tiu traduko devas aperi <u>baldaŭ</u> .
<u>tuj</u>	enseguida	La malfacilaĵo venos <u>tuj</u> , sed ne grave .
<u>jam</u>	ya	La infanetoj <u>jam</u> ekvidis ŝin .
<u>nun</u>	ahora	De <u>nun</u> vi povas inviti vian amikon .
<u>ankoraŭ</u>	todavía , aún	Mi <u>ankoraŭ</u> atendas dum du tagoj .
<u>ĵus</u>	recién	Lia baptfilino <u>ĵus</u> telefonis al li .
<u>ofte (mal.)</u>	frecuentem.(in.)	Ni konsultas <u>ofte (mal.)</u> la gvidlibron .
<u>plu , plue</u>	más , ya	Ŝi projektas <u>ne plu</u> skribi al li .
<u>neniam</u>	nunca	Oni devas <u>neniam</u> antaŭjuĝi agojn .
<u>iam</u>	en alguna época	<u>Iam</u> multaj kreis ke la Tero estas ebena.
<u>iam ajn</u>	alguna vez	Se vi <u>iam ajn</u> bezonas , konsultu al mi .
<u>kiam</u>	cuando, cuándo	Vi ĝin memoros <u>kiam</u> jam ne utilos .
<u>kiam ajn</u>	cuando quiera que	<u>Kiam ajn</u> li ekfajtis, la birdo kriis .
<u>tiam</u>	entonces	<u>Tiam</u> estos jam aŭtuno .
<u>ĉiam</u>	siempre	Li <u>ĉiam</u> ŝatas ludi sian gitaron .

2. Spacaj

<u>Jen</u>	he aquí	<u>Jen</u> la novaĵo !
<u>supre (mal.)</u>	arriba (abajo)	<u>Supre</u> sur la montaro (Abajo en el río)
<u>for</u>	lejos	<u>For</u> de vi , mi certe mortos !
<u>nenie</u>	en ningún lugar	Ni trovis <u>nenie</u> tiun ajon .
<u>ie</u>	en algún lugar	Sed ĝi certe estas <u>ie</u> en la domo .
<u>ie ajn</u>	en cualquier lugar	Ni devas ĝin trovi , <u>ie ajn</u> ĝi estas .
<u>kie</u>	donde , dónde	<u>Kie</u> mankas ankoraŭ ke mi serĉu ?
<u>tie</u>	allí	Mi ne memoras ĉu iu vidis <u>tie</u> .
<u>tie ĉi</u>	aquí	Ha , fine ! <u>Ĉi tie</u> ĝi estis kaŝata !
<u>ĉie</u>	en todo lugar	Mi pensis ke jam estis <u>ĉie</u> provita !

Oni indikas proksimecon spacan aŭ tempan per la adverba vortero ĉi:
ĉiflanke , ĉivespere kaj similaj .

mandarino	= mandarina (fr.)	matraso	= matraz
mandreno	= mandril (máquina)	matineo	= (una) matinal
mandrilo	= manáñal (mamíf.)	matutino	= maitines
manekeno	= maniquí	meblo	= mueble
manesoj	= manes (difuntos)	mecenato	= mecenas
manguso	= mangosta	megero	= harpía
manĝi	= comer	mejlo	= milla
maniko	= manga	meki	= balar
manki	= faltar	melo	= tejón
manĝekloj	= esposas (par)	meleagro	= pavo
mantelo	= capa , manto	melki	= ordeñar
manumo	= bocamanga , puño	melongeno	= berenjena
marĉo	= charca , pantano	nem	= mismo
marĉandi	= regatear	memori	= recordar
mardo	= martes	memuaro	= disertación académ.
marĝeno	= margen	menaĝerio	= zoo
markezo	= marquesina , toldo	mencii	= mentar , mencionar
markizo	= marqués	mendi	= encargar , pedir
marmoro	= mármol	menso	= mente
marodi	= merodear	mensogo	= mentira
marokeno	= tafilete	mento	= menta
Marso	= Marte	mergi	= sumergir
marĝi	= andar , marchar	meringelo	= merengue
marto	= marzo	meriti	= merecer
martelo	= martillo	merkredo	= miércoles
marteso	= marta (mamíf.)	merluĉo	= merluza
masiva	= compacto , masivo	meso	= misa
masko	= máscara	mesaĝo	= mensaje
masoni	= albañear	Mesio	= el Mesías
maste	= mástil	meti	= poner
mastiko	= masilla	metio	= oficio
mastro	= patrón , dueño	metroo	= tren subterráneo
maŝo	= malla; nudo corredizo	nevo	= gaviota
maŝino	= máquina	meza	= mediano
mato	= estera; mate (ajedr.)	mezono	= mesón (fis.atóm.)
mateo	= yerba mate	mezuri	= medir
mateno	= mañana (a.m.)	mi	= yo
matraco	= colchón	miaŭi	= maullar